

Фёдор Сологуб,
La disipulo

tradukita de Manfred Retzlaff

Stulte mi eluzis korpon mian,
Disipado estis tio ĉi,
Vidas elirejon mi nenian,
Nude, neŝirmite staras mi.

Kaj mi preĝas al la kara Dio,
-Tiel mi neniam petis Lin -:
"Donu Vi al mi da energio
iom, kiu plu vivtenos min.

Neportebaj afliktiĝoj teraj,
Kaj tro granda tera vivopen',
Sed kontraŭe ĉarmoj primaveraj
Kaj freŝiga akva ĉirkaŭpren'!

Kiel ardas la purpur-aŭroroj,
Kiel igas revu la jasmen',
Kiel rave amas inaj koroj,
Kiel kisas lipoj kun ĝojplen'!

Kaj ankoraŭ ĉi kisas' pasia, 1)
Kaj jasmen-aromo tiu ĉi,
La revado forta, idilia,
Kaj de l' versoĵ dolĉa melodi'!

Gloro kaj potenco estas via!
Mi Vin petas, kompatema Di':
Donu iom al vivtempo mia,
Por ke pluaĵn kantojn verku mi!"

*Traduko de la Rusa poeto "Расточитель" de
ФЁДОР СОЛОГУБ (Fjodor Kusmiĉ Teternikov,
*1863-03-01 - †1927-12-05) en Esperanton de
MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 2002-
08 .*

MR-392-1a / Arg-385-758 (2007-02-06
12:17:32)

*La vera nomo de la poeto estis: Фёдор
Кузьмич Тетерников (Fjodor Kusmiĉ Teter-
nikov), Фёдор Сологуб (Fjodor Sologub) estis
lia kaŝnomo (pseŭdonimo).*

Фёдор Сологуб,
Расточитель

Измотал я безумное тело,
Расточитель дарованных благ,
И стою у ночного предела,
Изнурен, беззащитен и наг.

И прошу я у милого Бога,
Как никто никогда не просил:
„Подари мне еще хоть немного
Для земли утомительной сил.

Огорченья земные несомны,
Непосильны земные труды,
Но зато как пленительны весны,
Как прохладны объятья воды!

Как пылают багряные зори,
Как мечтает жасминовый куст,
Сколко ласки в лазоревом взоре
И в лобзании радостных уст!

И еще вожденней лобзанья,
Ароматней жасминных кустов
Благодатная сила мечтанья
И певучая сладость стихов.

У тебя, милосердного Бога,
Много славы, и света, и сил.
Дай мне жизни земной хоть немного,
Чтоб я новые песни сложил!"

*Verkinto de tiu ĉi Rusa poeto estas ФЁДОР СОЛОГУБ
(Fjodor Kusmiĉ Teternikov, *1863-03-01 - †1927-12-
05), publikigita 1917-06-13.*

Arg-385-757 (2007-02-06 16:46:33)

*La vera nomo de la poeto estis: Фёдор Кузьмич
Тетерников (Fjodor Kusmiĉ Teternikov), Фёдор
Сологуб (Fjodor Sologub) estis lia kaŝnomo
(pseŭdonimo).*